

# *Internacia Tago de Edukado: Esperanto malfermas la vojon al vasta kultura ri?eco*




Foto: Universala Esperanto-Asocio

Edukado, kaj la transdono de scio, ri?igas la homan socion la? amaso da manieroj, ekde individua bonfarto kaj civitaneco, ?is ekonomia kresko, redukto de malegaleco kaj socia unui?o. ?i permesas al homoj kompreni sian kulturon kaj plene partopreni, ekonomie kaj politike, en socio. Per edukado por ?iuj, oni realigas aspirojn kaj trovas vojojn por vivi pli bone.

La temo de Unesko por 2024 estas "edukado por da?ra paco". Por kontra?batali perforton surbaze de diskriminacio, rasismo kaj malamo, kiuj kreskigas konfliktojn kaj aperigas novajn militojn, ni bezonas plifortigi devontigon al paco, unuavice per klerigo kaj edukado.

Edukado ludas esencan rolon en la socio. ?i estas homa rajto kaj publika respondeco. Bona edukado disvolvas sciojn, kaj kultivas en la lernantoj valorojn, sintenojn, kapablojn kaj kondutojn por fari?i pacaj agantoj en siaj komunumoj. Da?ra paco bezonas realigon de homaj rajtoj, demokratian regadon, dialogon, solidarecon kaj kunlaboron.

Por plena realigo de tiuj celoj, plurlingva edukado estas esenca: alfabetigo en la gepatra lingvo, profundi?o kaj regula uzo de pluraj lingvoj, inkluzive de tiuj regule uzataj en la koncerna lando, ?iutaga uzo de malsamaj lingvoj, interkultura interkompreni?o per internacie konataj lingvoj, kaj lernado tra la tuta vivo. Multlingvismo grave kontribuas al internacia konscio, kaj al lernado de la arto kaj scienco de homa kunvivado.

Ni speciale proponas tiun lernadon pere de Esperanto. La internacia lingvo ebligas anta?enigi senton de solidaro inter malsamdevenaj homoj, kune kun interkompreno, kaj estimo inter nacioj kaj komunumoj.

Esperanto malfermas la vojon al vasta kultura ri?eco, kaj al internacia socio kiu kunligas homojn el amaso da landoj. Nia Asocio forte laboras por proksimigi la homojn en paco. Ni anka? alianci?as kun aliaj similcelaj organizoj. Parolantoj de Esperanto, ekzemple, renkonti?as ?iujare en la Universala Kongreso de Esperanto ekde 1905. En 2024, unuafoje, la kongreso okazos en Afriko, en Aru?o, Tanzanio.

Mesa?o de Universala Esperanto-Asocio al UN.

Fonto: <https://esperantoporun.org/eo/eventoj-kaj-anoncoj>

---

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/344958-internacia-tago-de-edukado-esperanto-malfermas-la-vojon-al-vasta-kultura-riceco>



**Radio Habana Cuba**